

KATOLIKA SENTO

Periodico dell'Unione Esperantista Cattolica Italiana (UECI)

www.ueci.it

"Per la promozione della fratellanza e della comprensione tra i vari popoli di diverse lingue" (Paolo VI)

Periodico bimestrale - Reg. trib. di Vercelli 22.12.1997 n. 306 -
Sped. in abb.post. art. 2 comma 20/c L662/96 - filiale di Vercelli -
Direttore resp.: Mons. Gianni Ambrosio - Dir. e amm.: Vercelli, via Benadir, 62
Stampato da Centro Grafico Pirola-Lissone (MB)

Anno 99 - n.1 2020
Gennaio-Febbraio-Marzo

PASKO 2020

Ĉion oni faris rapidege, ĉar sunsubire komen-
ciĝis la Paska tago, dum kiu estis malpermesa-
te prizorgi la kadavrojn.

La enirejon de la tombo oni fermis per granda
ŝtono.

Luj virinoj, kiuj sekvis Jesuon ĝis la Kalvario sen
povi nenion fari por li, bone memoris la ejon
de la tombo, ĉar ili intencis reveni la tagon
post la sabato por doni al la kadavro de Jesuo
tiujn honorojn, kiujn ne estis eble doni je la
momento de la entombigo, pro la malmulta
tempo je dispono.

Kaj fakte, la tagon post
la sabato, frumatene ili
revenis kie estis la tom-
bo de Jesuo, sed trovis
ĝin malplena. Kio
okazis?

La ŝtono metita ĉe la
enirejo estis renversita
kaj la kadavro de Jesuo
estis malaperinta, sed
la bendoj kiuj vindis lin
kaj la mortotuko, tio
estas la tolaĵo kiu kovris
lian kapon, estis en la
ĝusta loko. Sed pri kiu
vivo temas? «Ne pri la
vivo antaŭ la morto, kaj
do pri la antaŭa vivo.

Tutto fu fatto in gran fretta, perché col tra-
monto iniziava il giorno di Pasqua, nel quale
era proibito prendersi cura dei cadaveri.
L'entrata del sepolcro venne chiusa con una
grossa pietra.

Alcune donne, che avevano seguito Gesù fin
sul Calvario senza poter far nulla per lui, ten-
nero bene a mente il luogo del sepolcro, poi-
ché avevano intenzione di tornare il giorno
dopo il sabato per rendere al cadavere di Gesù
quegli onori che non era stato possibile ren-
dergli al momento della sepoltura, a motivo
del poco tempo disponibile.



La resurrekto de Kristo
de Raffaello Sanzio (1483–1520)

E difatti, il giorno dopo
il sabato, di prima mat-
tina tornarono dov'era
il sepolcro di Gesù, ma
lo trovarono vuoto. Che
cosa era avvenuto?

La pietra posta all'en-
trata era stata ribaltata
e il cadavere di Gesù
era scomparso, ma le
bende che lo avvolge-
vano e il sudario, cioè il
panno che gli ricopriva
il capo, erano al loro
posto. Ma di quale vita
si tratta? «Non della
vita precedente alla
morte, e dunque della
vita di prima.

Jesuo ne resurektis kiel Lazaro, kiun li revenigis al la vivo, aŭ kiel la filo de la vidvino de Nain kaj la filineto de la sinagogestro.

Tiuj ĉi personoj fakte estis revivigitaj, nome reportitaj al la antaŭa vivo. Jesuo kontraŭe, per la resurekto, eniris en kondiĉon de vivo tute unika: li eniris en la pleneco de la dia vivo, kaj lia korpo estas ja realo, ĝi estas la korpo de Jesuo el Nazareth, kiu suferis la krucumadon, sed estas 'korpo de gloro', korpo 'spirita', deprenita el la surteraj kondiĉoj de spaco kaj tempo, de sufero kaj morto, tiel ke Jesuo ne plu povas morti kaj la morto ne plu havas povon sur li.

Li nun jam estas 'la Vivanto'». Alivorte, per la Resurekto Jesuo eniris definitive kun sia tuta homeco - korpo kaj animo - en la plenecon de la Dia vivo: do en vivo-kondiĉon, kiu estas trans ĉiu homa sperto kaj kiun ni ne povas priskribi krom utiligante bildojn kaj konceptojn, kiuj estas nur malfortega respiegulo de la realo.

Tiu ĉi korpo resurektinta ne povas esti priskribita: ni ne havas ian sperton, ni disponas nur je obskuraj indicoj de fremdeco, kiu ne neas ian proksimecon. La Dia Parolo ne respondas al la scivolemo, ĝi diras la plenecon al kiu kondukis la surtera vivo de Jesuo, malgraŭ la suferata morto. Tiu ĉi pleneco rilatas ĉiujn, kiuj kredas je Jesuo aŭ estas vokataj de li.

La Resurekto ne estas evento de la pasinteco, enskribita unu fojon por ĉiam en la senmoveco de la historio: evento pasinta ne plu estas aktuala, estas fermita.

Por la Resurekto la aferoj ne statas jene: ĝi agas hodiaŭ, ĉar hodiaŭ la Vivanto donas por ĉiam la Spiriton. Teologie la Resurekto de Jesuo Kristo ne estas simple kazo de ĝenerala revekiĝo el la mortintoj, kiu en si mem estus jam komprenebla, sed ja la unika evento kiu kondukis al plenumiĝo la enkarniĝon, la vivon de Jesuo kun ĝiaj apartaĵoj, lian suferon kaj lian morton, kaj pro tio ĝi estas la fundamento de la resurekto de tiuj, kiuj mortis en la fido je li kaj kun li.

La Resurekto signifas, ke Jesuo en sia tuta realo, pro tio ankaŭ tiu korpa, estis resurektita je

Gesù non è risorto come Lazzaro, che egli richiamò alla vita, o come il figlio della vedova di Nain e la figliuola del capo della sinagoga. Queste persone infatti furono risuscitate, cioè riportate alla vita di prima. Gesù invece, con la Resurrezione, è entrato in una condizione di vita assolutamente unica: egli è entrato nella pienezza della vita divina, e il suo corpo è sì reale, è il corpo di Gesù di Nazareth che ha subito la crocifissione, ma è un 'corpo di gloria', un corpo 'spirituale', sottratto alle condizioni terrestri di spazio e di tempo, di sofferenza e di morte, cosicché Gesù non può più morire e la morte non ha più potere su di lui.

Egli ormai è 'il Vivente'». In altre parole, con la Resurrezione Gesù è entrato definitivamente con tutta la sua umanità - corpo e anima - nella pienezza della vita di Dio: quindi in una condizione di vita che è al di là di ogni esperienza umana e che noi non possiamo descrivere se non servendoci di immagini e concetti che sono solo un debolissimo riflesso della realtà.

Questo corpo risorto non può essere descritto: non ne abbiamo alcuna esperienza, non disponiamo che gli indizi oscuri di una estraneità che non nega una certa prossimità. La Parola di Dio non risponde alla curiosità, essa dice la pienezza verso la quale conduceva la vita terrena di Gesù, malgrado la morte patita. Questa pienezza concerne tutti coloro che credono in Gesù o che sono chiamati da lui. La Resurrezione non è un evento del passato, inscritto una volta per tutte nell'immobilità della storia: un evento passato non è più attuale, è chiuso. Per la resurrezione non è così: essa opera oggi, poiché è oggi che il Vivente dona per sempre lo Spirito. Teologicamente, la Resurrezione di Gesù Cristo non è semplicemente un caso di risveglio generale dai morti, che in sé sarebbe già comprensibile, bensì l'evento unico che portò a compimento l'incarnazione, la vita di Gesù con le sue particolarità, la sua sofferenza e la sua morte, e che per questo è il fondamento della risurrezione di coloro che sono morti nella fede in lui e con lui.

La Resurrezione significa che Gesù nella sua realtà intera, pertanto anche corporea, fu risu-

la plenumo transfiguranta, je kiu li rajtis pro sia pasiono kaj morto.

Tiu ĉi kompleta plenumiĝo estas alia ol la vekigi de mortinto kaj reveno al la surtera vivo kun propra surtera korpeco.

La morto kaj la Resurekto de Jesuo Kristo estas unu sama proceso, intime konektita laŭ nedisigbla maniero. La morto estas definitiva estiĝo, plenumita estiĝo, en kiu la ekzisto maturiĝis ĝis la fino dum la tempo kaj en libereco, tiel ke la plenumiĝo ne estas io tute malsama kiu, kiel nova periodo post la malnova, simple estus aldonata.

La Resurekto de Jesuo Kristo signifas, aliflanke, ke la Sinjoro resurektis ĝuste ĉar li liberiĝis de la surtera limiganta korpeco kaj do per sia "foriro" li fariĝis reale Tiu, kiu estas proksima, kiu, per nova maniero ĉeesti, fariĝis proksimega al tiuj, kiuj kolektiĝas en lia nomo (Mat 18,20), sed ankaŭ al la mondo en ĝia tuteco.

Tio, kio ankoraŭ mankas, estas ke tio ĉi iĝu vaste konata kaj spertebla fare de ĉiuj: la lasta Kristreveno. La raporto de la Nova Testamento, pri la sperto de "iu de la transmondo", kiu devas "manifestiĝi" por ke la surteraj homaj okuloj povu lin vidi, de "iu de la transmondo", kiu transformiĝis kaj realiĝis apud Dio, ne koncernas ion "komprenebla" en la kadro de la homaj spertoj.

Sen la sperto de la Spirito - ĉi-kaze, sen sperto akceptita per la kredo kaj konfido, ke la vivo havas plenan sencon - la homa estaĵo ne povas sin allasi fidoplena je la paska atesto de la disĉiplinoj kaj de la disĉiploj de Jesuo.

Sed la Resurekto kiamaniere okazis? En la vortoj "la tria tago" iuj ne vidas la indikon de la dato de la Resurekto. Neniu vidis Jesuon resurekti kaj sekve oni ne povas scii kiam li resurektis.

Sed tiu esprimo indikas, ke la restado en la tombo estis mallongdaŭra, "portempa", kaj precipe ke li ne konis "la putradon de la tombo" (laŭ iuj judaj konceptoj la putriĝo de la kadavro en la tombo komenciĝis nur post la

scitato al compimento trasfigurante che gli spettò in virtù della sua passione e morte. Questo compimento concreto è diverso dal risveglio di un morto e da un ritorno alla vita terrena con la propria corporeità terrena.

La morte e la Resurrezione di Gesù Cristo sono un processo unico, intimamente connesso in maniera insolubile. La morte è un diventare-definitivo, un diventare-compiuto, nel quale l'esistenza si è maturata sino in fondo nella temporalità e nella libertà, cosicché il compimento non è qualcosa di completamente diverso che, come un periodo nuovo che segue il vecchio, gli sarebbe semplicemente aggiunto.

La Resurrezione di Gesù Cristo significa, d'altra parte, che il Signore risorto, proprio perché è liberato dalla corporeità terrena delimitante e dunque mediante il suo "andarsene", è diventato in realtà Colui che è vicino, che con un modo nuovo di presenza si è fatto vicinissimo a coloro che sono radunati nel suo nome (Mt 18,20), ma anche al mondo nella sua totalità.

Ciò che manca ancora, è che questo si renda manifesto e sperimentabile da parte di tutti: parusia. I resoconti del Nuovo Testamento che riportano l'esperienza di «uno dell'aldilà» che si deve «manifestare», affinché occhi umani terreni lo possano vedere, di «uno dell'aldilà» che è trasformato e compiuto presso Dio, non riguardano qualcosa di «comprensibile» nell'ambito delle esperienze umane.

Senza l'esperienza dello Spirito, vale a dire in questo caso senza l'esperienza accettata nella fede e nella fiducia della pienezza di senso dell'esistenza, un essere umano non può abbandonarsi fiducioso alla testimonianza pasquale delle discepole e dei discepoli di Gesù. Ma la Resurrezione è avvenuta in che modo? Nelle parole "il terzo giorno" alcuni vedono non l'indicazione della data della Resurrezione. Nessuno ha visto Gesù risorgere e non si può perciò sapere quando egli sia risorto.

Ma l'espressione indica che il soggiorno nella tomba è stato di breve durata, "passeggero" e, soprattutto, che egli non ha conosciuto "la corruzione del sepolcro" (secondo certe concezioni giudaiche, la decomposizione del cada-

tria tago kaj necesis pli ol tri tagoj por povi paroli pri “daŭra” restado en la tombo.

Al aliaj ekzegezistoj ŝajnas malpli artifice kaj pli logike vidi en la vortoj “la tria tago” kronologian indikon, kiu lokas la Resurekton en serio de okazintaĵoj: morto, entombigo, resurekto, apero.

Kiel la morto, la entombigo kaj la aperoj havas daton, tiel datiĝas ankaŭ la resurekto.

Nome, per sia konstanta insistado pri “tria tago”, la praEklezio ŝajne volis deklari, ke la Resurekto estas fakto reale okazinta, tiom ke oni povas fiksi la daton: Jesuo el Nazareth, kiun Judoj mortigis krucumante lin, Dio revivigis la trian tagon.

vere nel sepolcro iniziava solo dopo il terzo giorno e ci volevano più di tre giorni perché si potesse parlare di dimora “stabile” nel sepolcro).

Ad altri esegeti sembra meno artificioso e più naturale vedere nelle parole “il terzo giorno” un’indicazione cronologica, che colloca la Resurrezione in una serie di fatti: morte, sepoltura, resurrezione, apparizione.

Come la morte, la sepoltura e le apparizioni sono datate, così è datata anche la risurrezione. Cioè, con l’insistenza sul “terzo giorno”, la Chiesa primitiva sembra voler affermare che la Resurrezione è un fatto realmente avvenuto, tanto che se ne può stabilire la data: Gesù di Nazareth, che i Giudei uccisero appendendolo a una croce, Dio lo ha risuscitato al terzo giorno.

Esperantigis Giorgio Denti

don Salvatore Rinaldi



designed by freepik

Intenzioni dell’Apostolato della preghiera 2020

Intencoj de la Preĝa Apostol-agado 2020

La preĝ-intencoj konfidentaj de la Papo al sia tutmonda preĝ-reto. Ĉiu proponata monata intenco povas esti: aŭ “por la evangelizado” aŭ “universala”.

Aprilo (universala) - Liberiĝo el la toksaj dependoj.

Ni preĝu por ke ĉiuj homoj sub la influo de la toksaj dependoj estu bone helpataj kaj akompanataj.

Majo (por la evangelizado) - Por la diakonoj.
Ni preĝu por ke la diakonoj, fidelaj je la servo al la Parolo kaj al malriĉuloj, estu vivodona signo por la tuta Eklezio.

Junio (por la evangelizado) - La vojo de la koro.
Ni preĝu por ke tiuj kiuj suferas trovu vojojn de vivo, lasante sin esti tuŝitaj de la koro de Jesuo.

Le intenzioni di preghiera che il Papa ha affidato alla sua rete mondiale di preghiera. L’intenzione mensile proposta può essere: o “per l’evangelizzazione” o “universale”

Aprile (universale) - Liberazione dalle dipendenze

Preghiamo affinché tutte le persone sotto l’influenza delle dipendenze siano ben aiutate e accompagnate.

Maggio (evangelizzazione) - Per i diaconi
Preghiamo affinché i diaconi, fedeli al servizio della Parola e dei poveri, siano un segno vivificante per tutta la Chiesa.

Giugno (evangelizzazione) - Il cammino del cuore
Preghiamo affinché coloro che soffrono trovino percorsi di vita, lasciandosi toccare dal Cuore di Gesù.

Karaj amikoj,

nova jaro komenciĝis por nia revuo, la naŭdek-naŭa. Ni ĉiuj esperas, ke ĝi estos pli trankvila ol la pasinta jaro, kiu kaŭzis al ni dolorojn kaj zorgojn. Multaj problemoj ankaŭ ne estas solvitaj, sed nin konsolas la kuraĝigo, kiun multaj el vi donis al ni. Novaj anoj kaj simpatiantoj proponis sian helpon rajtigante la publikigon de artikoloj kaj poemoj. La revuo ĉiam estos dulingva kaj por faciligi la lernadon de esperanto, kiel petis iuj el niaj anoj, kiuj uzas ĝin por la kursoj, kaj ĉar iuj abonantoj ne scipovas esperanton, sed ŝatas niajn artikolojn.

Por la momento, estas interrompita la rubriko "Pri nia lingvo", kiu estis persone redaktita de la forpasinta Daminelli, ĉar ni ne trovis en liaj dokumentoj utilan tekston por daŭrigi lian laboron. Ni esperas refari ĝin estonte.

En la rubriko "*Parolu al mi en via lingvo*" ni meditos pri la gravaj problemoj por transvivi de lingvoj taksataj minoritataj, ĉerpante inspiron el la laboro, kiun la Eklezio estas faranta por disvastigi la Vorton tra la tuta mondo respektante la lokajn kulturojn.

La rubriko "*La beleco de la kredo*" prezentos al ni artistojn el la tuta mondo, kiuj produktas religiajn bildojn por diskonigi la kristanan kredon. Uzante novajn teknikojn kaj materialojn ili ŝanĝas la ikonografion de la pasintaj jarcentoj adaptigante ĝin al novaj tempoj. Ni dankas kelkajn el ili ĉar ili disponigas siajn verkojn senpage al ĉiuj, kiuj uzas ilin por edukaj celoj.

Pastro S. Rinaldi, en la rubriko "*Kredo kaj socio*", komentos la faktojn kaj problemojn de nia socio. Ni petas komprenemon pri la misfunkciadoj de la pasinta jaro kaj ni esperas je via subteno.

Sendu al ni konsilojn, novaĵojn kaj fotojn al: katolika.sento@ueci.it aŭ al U.E.C.I. Via F. Filzi 30 / A 20851 LISSONE (MB)

Cari amici,

è iniziato un nuovo anno per la nostra rivista, il novantanovesimo. Noi tutti ci auguriamo che sia più sereno dello scorso anno, che ci ha regalato dolori e preoccupazioni. Molti problemi non sono ancora risolti, ma ci consola l'incoraggiamento che molti di voi ci hanno dato. Nuovi associati e simpatizzanti hanno offerto il loro aiuto autorizzando la pubblicazione di articoli e poesie. La rivista sarà sempre bilingue sia per facilitare l'apprendimento dell'esperanto, come ci è stato chiesto da alcuni nostri associati che la utilizzano per i corsi, sia perché alcuni abbonati non conoscono l'esperanto, ma apprezzano i nostri articoli.

Per il momento viene sospesa la rubrica "*Pri nia lingvo*" che era curata personalmente dal compianto Daminelli poiché non abbiamo trovato nei suoi documenti alcuno scritto utile a continuare il suo lavoro. Confidiamo in futuro di riprenderla. Nella rubrica "*Parolu al mi en via lingvo*" rifletteremo sui gravi problemi di sopravvivenza delle lingue considerate minoritarie prendendo spunto dal lavoro che la Chiesa sta facendo per diffondere il verbo in tutto il mondo nel rispetto delle culture locali. La rubrica "*La beleco de la kredo*" ci presenterà artisti di tutto il mondo che producono immagini religiose per diffondere il credo cristiano. Utilizzando tecniche e materiali nuovi essi stanno cambiando l'iconografia dei secoli passati adattandola ai tempi nuovi. Ad alcuni di loro va il nostro ringraziamento perché mettono a disposizione gratuitamente le loro opere per tutti quelli che le utilizzano per scopi educativi. Don S. Rinaldi, nella rubrica "*Fede e società*", commenterà fatti e problemi della società. Chiediamo comprensione per le disfunzioni dello scorso anno e speriamo nel vostro sostegno.

Inviatemi suggerimenti, notizie e foto a: katolika.sento@ueci.it o all'indirizzo U.E.C.I. Via F. Filzi 30/A 20851 LISSONE (MB)

PAROLU AL MI EN VIA LINGVO

Tago de la gepatra lingvo

“La gepatra lingvo en kiu ni naskiĝis kaj en kiu ni lernis orientiĝi en la mondo ne estas ganto, ilo, kiun oni uzas kaj tuj forĵetas. Ĝi dismetiĝas en nia psikologia vivo, en niaj memoroj, mensaj kunigoj kaj skemoj”.

Giornata della lingua madre

“La lingua madre in cui siamo nati e abbiamo imparato a orientarci nel mondo, non è un guanto, uno strumento usa e getta. Essa innerva la nostra vita psicologica, i nostri ricordi, associazioni, schemi mentali”.

(T.De Mauro)



Por “savi” pli ol 3.000 vortojn de la itala lingvo, kiuj riskas esti forgesitaj, la eldonejo Zanichelli prezentis en la ĉefaj italaj urboj, de Septembro ĝis Novembro 2019, la projekton **#paroledasalvare**.

En la eldono 2020 de la vortaro Zingarelli 3.126 vortoj estis akompanataj de floreto ♣, grafika simbolo kiu markas ilin kiel *Vortojn savindajn*: vortoj de la komuna lingvo pli kaj pli ne ĉeestantaj en la skribita kaj parola uzo nek en la amaskomunikiloj.

Zanichelli celas konigi parton malpli konatan de la itala leksika havaĵo kaj inviti al ĝia uzado por pliriĉigi per diversaj nuancoj la propran komunikadmanieron.

La malriĉiĝo de la leksiko ofte kaŭzas malriĉiĝon de la pensado, de la rezono kaj de la komunikkapabloj.

Per “salvare” oltre 3.000 parole della lingua italiana che rischiano di essere dimenticate, la casa editrice Zanichelli ha presentato nelle principali città italiane, da settembre a novembre 2019, il progetto **#paroledasalvare**

Nell’edizione 2020 del vocabolario Zingarelli 3.126 parole sono accompagnate da un fiorellino ♣, simbolo grafico che le contrassegna come *Parole da salvare*: termini della lingua comune sempre meno presenti nell’uso scritto, orale e nei mezzi di informazione. Zanichelli vuole far conoscere una parte meno nota del patrimonio lessicale italiano e invitare al suo utilizzo per arricchire di sfumature il proprio modo di comunicare. L’impoverimento del lessico comporta spesso un impoverimento del pensiero, del ragionamento e della capacità di comunicare.



♣ **filibustière** / filibus'tjere/
 [sp. *filibustero*, dal neerl. *vrijbuiter* 'libero cacciatore di bottino', comp. di *vrij* 'libero' e *buit* 'bottino' ✨ 1772

s. m.

1 corsaro

2 (f. -a) (fig.) avventuriero senza scrupoli, mascalzone

KIAMANIERE ONI SAVAS VORTON?

Jen du originalaj manieroj proponitaj de Zanchelli:

- Presado de poŝtkartoj, kiuj entenas vorton savindan kune kun ĝia signifo, por afranki kaj sendi.
- Kunlaboro kun la mod-marko MSGM, kiu elektis "adopti" kvin vortojn por krei specialan kolekton de T-ĉemizoj sur kiuj printi diversajn vortojn kun ties signifo: **aŭdaca, impeta, mallogika, viva kaj ĝojoplena.**

Esperantigis F.Fagnani

COME SI SALVA UNA PAROLA?

Ecco due modi originali proposti da Zanchelli:

- Stampa di cartoline che contengono una parola da salvare con il suo significato, da affrancare e spedire.
- Collaborazione con il marchio di moda MSGM che ha scelto di "adottare" cinque parole per creare una speciale collezione di magliette su cui sono stampate cinque diverse parole e i loro significati: **impavido, impetuoso, illogico, vivido e radioso.**

T.Fossati



SINODO POR AMAZONIO



La fina Dokumento de la tutamazonia Sinodo konsistas el kvin ĉapitroj, plus enkonduko kaj mallonga konkludo.

La ĉefaj pridiskutitaj temoj estas: misio, enkulturigo, tuteca ekologio, defendo de la indiĝenaj popoloj, amazonia ritario, rolo de virinoj kaj novaj paŝtistaj servadoj, precipe en lokoj kie estas malfacile aliri al la Eŭkaristio.

La **Konvertiĝo** estas la konduka fadeno de la fina Dokumento.

La unua **konvertiĝo** estas tiu **paŝtista**, al kiu ĉiuj baptitoj estas vokataj, por konstrui Eklezion misiistan, Eklezion kun vizaĝo kaj koro indiĝena, kamparana, afrik-devena kaj juna.

La dua **konvertiĝo** estas **kultura**.

Diversaj estas la proponoj pri tio: el la starigo de lerneja dulingva amazonia reto ĝis la evoluo de la interkultura edukado.

La tria **konvertiĝo** estas **ekologia**. La dokumento kuraĝe denuncas la detruon kaŭzitan de la ekstraktaj aktivadoj. La Eklezio proklamas sian subtenon al la defendo de la vivo, de la lando kaj de la originaj amazoniaj kulturoj.

Il Documento finale del Sinodo panamazzone si articola in cinque capitoli, più un'introduzione ed una breve conclusione.

I principali temi discussi: missione, inculturazione, ecologia integrale, difesa dei popoli indigeni, rito amazzonico, ruolo della donna e nuovi ministeri, soprattutto in zone in cui è difficile l'accesso all'Eucaristia

La **Conversione** è il filo conduttore del Documento finale.

La prima **conversione** è quella **pastorale**, a cui tutti i battezzati sono chiamati per costruire una chiesa missionaria, una chiesa con volto e cuore indigeno, contadino, afrodiscendente e giovane.

La seconda **conversione** è **culturale**.

Varie le proposte al riguardo: dalla creazione di una rete scolastica bilingue amazzonica allo sviluppo dell'educazione interculturale.

La terza **conversione** è **ecologica**. Il documento denuncia con coraggio lo scempio prodotto dalle attività estrattive. La chiesa proclama il suo sostegno alla difesa della vita, della terra e delle culture originarie amazzoniche.

La kvara **konvertiĝo** estas **sinoda**. Necesas trovi novajn ekleziajn vojojn. Oni rimarkigas la urĝon lanĉi kaj doni ne ordinitan paŝtistan oficon al viroj kaj virinoj, laŭ egaleca maniero.

Tuta parto titolita “la ĉeesto kaj la horo de la virino” estas dediĉita al la ina vizaĝo de la amazonia Eklezio.

Krome, por certigi la Eŭkaristion al komunumoj, kiuj estas devigataj resti sen ĝi dum monatoj, oni pritraktis la eblecon ordinar pastroj virojn taŭgajn kaj agnoskatajn de la komunumo.

Fine, estos kreita konstanta kaj reprezenta episkopara administrafako, kiu antaŭenpuŝu la sinodecon en Tutamazonio.

Al ĉi-lasto estos konfidita la pristudo kaj la eventuala prilaboro de amazonia rito, kiu esprimu la liturgian, teologian, disciplinan kaj spirititan havaĵon de tiu regiono.

La quarta **conversione** è **sinodale**. Occorre trovare nuovi cammini ecclesiali. Si ribadisce l'urgenza di promuovere e conferire ministeri non ordinati a uomini e donne in modo paritario.

Un'intera sezione dal titolo “la presenza e l'ora della donna” è dedicata al volto femminile della chiesa amazzonica.

Inoltre, per garantire l'Eucaristia a comunità che sono costrette a privarsene per mesi, si è discusso della possibilità di ordinare presbiteri uomini idonei e riconosciuti dalla comunità.

In conclusione, sarà costituito un organismo episcopale permanente e rappresentativo che promuova la sinodalità nella Panamazonia.

A quest'ultimo sarà affidato lo studio e l'eventuale elaborazione di un rito amazzonico che esprima il patrimonio liturgico, teologico, disciplinare e spirituale di questa regione.

PREĜO POR AMAZONIO de Pastro Josafá Carlos De Siqueira

“Kreinto de la universo, dankon pro la belega amazonia plugarbaro. Ni povas admiri ĉiujn ties detalojn.

Mi deziras laŭdi vin pro la faŭno tiel riĉa, pro la birdoj, pro la fiŝoj kaj la multnombraj primatoj de la arbaro.

Mi ankaŭ laŭdas vin pro la bongustaj fruktoj de vi kreitaj ĉar ni, viroj kaj virinoj, povas rekoni vian bonecon.

Mi volas danki vin pro la tradiciaj loĝantaroj de la arbaro: de ili ni lernis la jarmilan saĝon.

Mi petas vin nin helpi defendi, konservi kaj gardi la amazonian plugarbaron, por ke la estontaj generacioj havu la eblon ekkapti, studi kaj admiri la plej grandan biologian heredaĵon de la lando kaj la mondo”.

“Creatore dell'universo, grazie per la magnifica foresta amazzonica. Di essa possiamo ammirare tutti i particolari.

Desidero lodarti per la fauna così ricca per gli uccelli, per i pesci e i numerosi primati della foresta.

Ti lodo anche per i frutti saporiti da te creati perché noi, uomini e donne, possiamo riconoscere la tua bontà.

Desidero ringraziarti per le popolazioni tradizionali della foresta: da loro abbiamo appreso la saggezza di millenni.

Chiedo a te di aiutarci a difendere, conservare e preservare la foresta amazzonica affinché le generazioni future abbiano l'opportunità di cogliere, studiare e ammirare il più grande patrimonio biologico del paese e del mondo”.

LA BELECO DE LA KREDO

*Via arto estas eltiri el la ĉielo de la spirito ĝiajn trezorojn
kaj vesti ilin per vorto, koloroj, formo.....(Paŭlo la 6-a, 1964)*

La logo de Sinodo por Amazonio memorigas la riĉecon de la koloroj de Amazonio kaj ankaŭ resumas ĉiujn temojn de la Sinodo dezirata de Papo Francisko. Unuavide oni rekonas la bildon de folio. Duona parto memorigas la biodiversecon de Amazonio kaj ĝian riĉecon de naturaj rimedoj, dum la alia duono reproduktas la teksitaĵon de tipaj indiĝenaj korboj memorigante la kulturon de la loĝantaroj.



Il logo del Sinodo per l'Amazonia richiama subito la ricchezza dei colori dell'Amazzonia e riassume anche tutti i temi del Sinodo voluto da papa Francesco. A prima vista si riconosce l'immagine di una foglia. Una metà richiama la biodiversità dell'Amazzonia e la sua ricchezza di risorse naturali, mentre l'altra metà riproduce la trama di tipiche ceste indigene ricordando la cultura delle popolazioni.

La movo de la folio rememoras la ideon pri flamo, kiu reprezentas la Sanktan Spiriton kiu gvidas la sinodajn Patrojn. La unueco de la amazonia regiono estas reprezentata de la koloroj de ĉiuj flagoj de la Landoj de Sud-Ameriko kaj de la rivero kiu kunigas la tutan regionon, kun ĝiaj enflantoj kaj basenoj. La rivereto trairas la krucon kaj simbolas la tutan katolikan episkoparon kaj la kristanojn en la mondo.

La logo estas kreita de la brazila artisto Aurélio Fred, de Ateliê 15, cifereca arta projekto en kiu diversaj artistoj kunlaboras.

Il movimento della foglia richiama l'idea di una fiamma che rappresenta lo Spirito Santo che guida i Padri sinodali. L'unità della regione amazzonica è rappresentata dai colori di tutte le bandiere dei Paesi del Sud America e dal fiume che unisce l'intera regione, con i suoi affluenti e bacini. Il rio arriva a solcare la croce e simboleggia tutto l'episcopato cattolico e i cristiani nel mondo.

Il logo è stato creato dall'artista brasiliano Aurélio Fred, di Ateliê 15, che è un progetto di arte digitale a cui collaborano vari artisti.

En la retejo: www.facebook.com/Atelie15/ vi povas admiri multegajn verkojn de Sankta Arto. La artisto havis la ideon krei kontraŭstresan libron "Koloroj de kredo" kiu enhavas ekskluzive religiajn desegnaĵojn kun la celo konigi la kristanismon. El intervjuo kun

Sul sito: www.facebook.com/Atelie15/ si possono ammirare moltissimi lavori di arte sacra. L'artista ha avuto l'idea di realizzare un libro anti stress "Colori della fede" che contiene esclusivamente disegni religiosi con lo scopo di far conoscere il cristianesimo. Da


Aurélio Fred: “Ĝi estas la unua kristana kolo-rebla libro kaj estas adresita al plenkreska publiko, ekzemple al maljunuloj kiuj kolektiĝas en grupoj por kolorigi en la placoj. Fakte hodiaŭ ni ricevas en nia paĝo fotojn de infanoj kaj junuloj, kiuj ne estas katolikoj kaj kiuj ricevis la mesaĝon de la libro”.

Esperantigis N. Cescotti Covelli



un'intervista ad Aurelio Fred: “È il primo libro da colorare cristiano ed è stato rivolto ad un pubblico adulto, es. gli anziani che si riuniscono in gruppi a colorare nelle piazze. In realtà oggi riceviamo sulla nostra pagina foto di bambini e giovani, che non sono cattolici e che ricevono il messaggio del libro.”

T.Fossati



AMUZE *(Zorge de Giovanni Gazzola)*

Ĉiuj ajn rajtas kontribui sendante al ni siajn humoraĵojn, kondiĉe ke ili estu en Esperanto.

- Sur la strato, senhejmulo demandas preterpasantinon: “Bonvolu doni al mi 20 eŭrojn por kafo?” “Sed - respondas la alia surprizita – kafo ne kostas 20 eŭrojn”. “Kara sinjorino, mi ne scias kiel oni kutimas fari en via medio sed en la mia, ĝenerale, oni havas la kutimon doni belan trinkmonon al la bufedisto”.
- “Paĉjo, kio estas sinonimo?”. “Ĝi estas vorto, kiun ni uzas kiam ni ne scias kiel oni skribas la alian”.
- Virino sinprezantas al la direktoro de svatagentejo: “Mi estas konvinkita ekologistino. Mi batalas por la aparta kolektado kaj la reciklado de materialoj”. “Nu, bone! ... Mi havas la viron por vi: li divorcis tri fojojn”.
- Babilado inter puloj: “Se ni daŭre laboras ĉe la cirko ni gajnos plensakon da mono kaj ni, fine, povus aĉeti hundon por ni”.

Nia eta Parnaso



Rubrica dedicata alla Poesia - Rubriko dediĉita al Poezio

Resurrezione laica

È il giorno della Resurrezione
di Uno che prende su di sé
i nostri peccati,
ma che non ci esime
dal dovere
di risalire la china,
di liberarci
dall'egoismo dalla superbia
dalla malvagità
che si occulta in noi.
Non ci esime dal dovere gioioso
di combattere il buio e risorgere alla luce.

Amerigo Iannacone

Amerigo Iannacone naskiĝis en Venafro (Isernio) la 17-an de Majo 1950 kaj mortis en Venafro la 12-an de Julio 2017. Li publikigis pli ol kvardek libroj, konsistantaj el poemaroj, libroj el rakonta ĝenro, eseoj, tradukoj kaj alio.



Laika resurekto

Estas la tago de la Resurekto
de lu, kiu prenas sur sin
niajn pekojn,
sed kiu ne liberigas nin
de la devo
resupreniri la deklivon,
liberigi nin
el la egoismo, el la aroganteco,
el la fieco,
kiu kaŝas sin en ni.
Li ne nin liberigas de la ĝoja devo
batali kontraŭ la mallumo kaj resurekti
al la lumo.

La unua, *Pensieri della sera*, datiĝas 1980; la plej freŝdataj: *Eppure* (2015) kaj ĝia versio en Esperanto, *Kaj tamen* (2016). Inter la libroj el rakonta ĝenro, rimarkindas *A zozzo nel tempo che fu* (2002) plurfoje represita; *Il paese a rovescio e altre fiabe* (2008); *Cronache reali e surreali* (2008); *Matrioska e altri racconti* (2011) kaj *C'ero anch'io – Un'auto-biografia o quasi*, lasta laboro publikigita en aprilo 2017. Li estis direktoro de la monata gazeto literatura kaj varikultura *Il Foglio Volante - La Flugfolio*, de li mem fondita, aperinta seninterrompe de 1986 ĝis 2018. Li akiris dufoje la Premion de la Ĉefministro por la literatura kritiko. En 2015 li ricevis la Premion "Val di Comino" pri "Ĵurnalismo kultura" kaj pri la defendo de la itala lingvo. Li estis fondinto kaj direktoro de Eldonejo Eva, kiu aperigis ĝis nun preskaŭ 500 librojn.

Kaj tio min surprizas

(artikolo pri la poezio de Amerigo Iannacone)

Relegante dum la tempo kaj kun la ĝusta medita trankvilo la poemojn de A. Iannacone, mi rimarkis, ke unu el la gvidfadenoj estas la temo de la vorto, aŭ, pli ĝuste, de la graveco de la vorto. Por poeto, la vorto havas valoron preskaŭ “sanktega”, ĉar ĝi estas ĉio, kion ĝi havas kundividebla, donacebla, kaj, ĉar ĝi estas io tut-unua en si mem; ĝi estas la esprimo de si mem. Sen la vorto, poeto ne estus tia, nek havus sencon ekzisti kiel poeto.

La vorto trapenetas lian tutan vivon. En la unua verso de poemo kiu titoliĝas “**Testamento**” li diras “**mi kapablas lasi al vi nenion krom vortoj**”. En alia poemo titolita “**Cerco nelle parole**” (Mi serĉas en la vortoj) li diras, ke li serĉas en la vortoj kunestadon kaj signojn de espero, kiam ĉirkaŭe, en la personoj indiferentaj, li trovas nek konscion nek percepton, sed supraĵecon kaj blindecon. Aldone, en alia kroma poemo, dediĉita al la elekto esti poeto, titolita “**Anni di parole**” (Jaroj da vortoj) li diras: “**Fuĝis rapide / - la mondo rigardis aliloken - / jaroj, jardekoj da vortoj. / Vivoj por la vorto / dum aliaj pensis pri alio. / Sin demandi, / ĉu ĉio vere estis vana, / ĉu la elekto estis ĝusta / aŭ ĉu ĉe la fatale vojkruĉiĝo / estis pli bone eniri la vojon / pli evidentigan, pli facilan. / Ne estis via la elekto. / Ĝi havas vivon sian, / ja ĝi vin spronas, / vin puŝas aŭ vin trenas, / vin gastigas aŭ vin enfermas, / estas ĝi, la vorto**”.

Alia konstanta temo en la poemoj de A. Iannacone estas la espero malgraŭ ĉio.

Se je unua supraĵa legado oni povas lasi sin trompi, aŭ almenaŭ oni tion riskas, fare de ŝajna melankolio, baldaŭ, je pli atenta tralego, oni ekkonscias, ke la ŝajna tristo estas, envere, medito laŭpunkta kaj profunda, rigardo objektiva kaj penetra en la realon, kiu lasas spacon al la feliĉa fino kaj kiu ne ekskludas en ĉiu cirkonstanco, ja ĝuste malgraŭ ĉio, pozitivan solvon.

En poemo titolita “**Ogni giorno è nuovo**” (Ĉiu tago estas nova) li diras: “**Sed kial do vi daŭri-**

E mi sorprende

(artikolo sulla poesia di Amerigo Iannacone)

Rileggendo nel tempo e con la giusta calma meditativa le poesie di A. Iannacone ho notato che uno dei fili conduttori è il tema della parola, o meglio dell'importanza della parola.

Per il poeta la parola ha un valore quasi “sacro” in quanto è tutto ciò che ha di condivisibile, di donabile e in quanto è un tutt'uno con sé, è l'espressione di sé.

Senza la parola il poeta non sarebbe tale, non avrebbe senso di esistere come poeta.

La parola permea tutta la sua vita. Nel primo verso di una poesia che si intitola “**Testamento**” dice «**non so lasciarvi altro che parole**».

In un'altra poesia intitolata “**Cerco nelle parole**” dice di cercare nelle parole compagnia e semi di speranza, quando intorno nelle persone indifferenti non trova consapevolezza né contezza, ma leggerezza e cecità.

Poi in un'altra poesia ancora, dedicata alla scelta di essere un poeta, intitolata “**Anni di parole**” dice: «**Fuggirono veloci / - volgeva altrove il mondo - / anni, decenni di parole. / Vite per la parola / mentre altri pensavano ad altro. / Domandarsi / se tutto davvero fu vano / se la scelta fu giusta / o se al bivio fatale / era meglio imboccare la via / più appariscente più agevole. / Non fu tua la scelta. / Ha una sua vita, / è lei che ti sprona / ti spinge o ti trascina / ti ospita o ti reclude / è lei, la parola**».

Un altro tema costante nelle poesie di A. Iannacone è quello della speranza nonostante tutto. Se a una prima superficiale lettura ci si può lasciar ingannare, o almeno se ne corre il rischio, da un'apparente malinconia, presto – a una lettura più attenta – ci si rende conto che l'apparente tristezza è in verità una riflessione puntuale e profonda, uno sguardo oggettivo e penetrante sulla realtà, che lascia spazio al lieto fine e che non esclude in ogni circostanza, nonostante tutto appunto, un risvolto positivo. In una poesia intitolata “**Ogni giorno è nuovo**” dice: «**Ma perché mai continui a piangere te**

gas priplori vin mem? / Priplori la vivon nevitivan / forgesante vivi. / Priplori vin dum la mondo iras. / Maĉi nostalgion pri tagoj belaj / pri jaroj kiuj belaj povis esti sed ne estis. // Sed ĉiu tago estas nova / kaj la vivo tuta konsistas el momentoj. / Lernu kaj vivu la fuĝantajn momentojn.”

Plue, estas la poemo titolita **“Tutto fu degno”** (Ĉio estis inda), en kiu li diras, sume, ke **“ĉio – ĉiu horo ĉiu minuto – estis ĉiam inda esti travivata”**. Kaj krome mia preferata, tiu kiu estas skribita ankaŭ sur lia tombo, kiu titoliĝas **“Eppure”** (Kaj tamen) en kiu li diras: **“Kaj tamen / ekzistas ĉiam kaŭzo / por vivi / ankaŭ kiam / vi sukcesas vidi nenion. / Kaj tamen / ĉiuj, ankaŭ vi / havas rolon / kaj havas lokon / en la historio de la homo”**.

Plia sona fono de la tuta poezia produktaĵo de A. Iannacone estas la malfermo al la dia revelacio en la homeco. La poeto ne kutimas alpreni pozicion aŭ sin deklari klare en iu kategorio de kredo. Sed multaj estas la elementoj en liaj liriko kiuj lin identigas en la atestanto. Ne sufiĉas diri “en la kristano”, sed ĝuste “en la atestanto”, en tiu kiu ja travivas la valorojn, kiujn li proklamas. Ĉar sin deklari en la poemoj kiel konanto de la kristanaj principoj povus ŝajni eĉ masko, male por A. Iannacone ĝi estas alio. Ĝi estas la preciza malo.

Li estas antaŭ ĉio atestanto de tio, kion li verkas, li ĝin enkarnigas per sia tuta ekzisto, li vere kredas je ĝi.

En la poemo **“Pasqua con te stesso”** (Pasko kun vi mem) li skribas:

“Prefere ol

Pasko kun kiu vi volas [...]

Pasko kun vi mem

por retrovi iun “vin”

kiun vi ne plu konas” esprimante per malmultaj versoj (sed verdire jam en la titolo) kernan koncepton de la tuta kristana revelacio: “Jesuo estas la homo kiu malkaŝas plene la homon al si mem” (vidu *Gaudium et spes*, n-ro 22). Mi citas ankoraŭ unu poemon, verkitan dum liceaj jaroj. Ĝi titoliĝas **“Ogni mattino”**:

“Ĉiun matenon / je mia vekigo / mi sentas

stesso? / A rimpiangere la vita non vissuta / dimenticandoti di vivere. / A compiangerti mentre il mondo va. / Masticare nostalgia di giorni belli / di anni che belli potevano essere e non furono. // Ma ogni giorno è nuovo / e la vita tutta si compone di attimi. / Impara e vivi gli attimi fuggenti.”

Poi c’è la poesia intitolata **“Tutto fu degno”** in cui dice in definitiva che **«tutto – ogni ora ogni minuto – fu degno sempre d’essere vissuto»**.

E poi la mia preferita, quella che è scritta anche sulla tomba, che si intitola **“Eppure”** in cui dice: **«Eppure / c’è sempre un motivo / per vivere / anche quando / non riesci a vederne nessuno. / Eppure / tutti, anche tu, / hanno un ruolo / e hanno un posto / nella storia dell’uomo»**.

Ancora un sottofondo sonoro dell’intera produzione poetica di A. Iannacone è l’apertura alla rivelazione divina nell’umanità. Il poeta non suole schierarsi o dichiararsi apertamente in una categoria di fede. Ma tanti sono gli elementi nelle sue liriche che lo lasciano identificare nel testimone. Non basta dire “nel cristiano”, ma proprio “nel testimone”, in colui che cioè vive i valori che proclama. Perché spacciarsi nelle poesie come conoscitore dei principi cristiani potrebbe sembrare anche una maschera, invece per A. Iannacone è tutt’altro. È l’esatto contrario.

Lui è prima di tutto testimone di quello che scrive, lo incarna con la sua intera esistenza, ci crede davvero.

Nella poesia **“Pasqua con te stesso”** scrive:

“Piuttosto che

Pasqua con chi vuoi [...]

Pasqua con te stesso

per ritrovare un te

che non conosci più” esprimendo in pochi versi (ma a dire il vero già nel titolo) un concetto cardine di tutta la rivelazione cristiana: «Gesù è l’uomo che svela pienamente l’uomo a sé stesso» (cfr. *Gaudium et Spes*, n. 22). Cito ancora una poesia, scritta nei suoi anni del liceo. S’intitola **“Ogni mattino”**:

«Ogni mattino / al mio risveglio / sento

ŝvebanta super mi / vian grandecon. / Mi scias, ke vi koncedis al mi / plian tagon. / Mi scias, ke vi mi pardonis. Ke vi estis pli bona / ol justa. / Ĉar vi volas, / ke mia vivo estu senmakula. / Kaj, se mi ne estas, / estas vi, kiu, / per via totala pureco, / ĉiun tagon forviŝas la nigron / por ke mi rekomencu la vivon / en libro ree blanka”.

Je ĉi tiu punkto mi konkludas – sed nur ĉar mi ne povas analizi ĉiujn temojn kaj ĉiujn poemojn en unu artikolo – per la “mistero”, plia sona fono de la poezia produktaĵo de A. Iannacone, ĝis la lasta eldonita kolekto *Eppure*, kiu estas trapenetrata de mistero. Kiam en la poemo **“Un poco di te”** (lom da vi) li parolas pri siaj geamikoj, kiuj mortis antaŭ li, li diras **“ke ili jam trairis la sojlon de la mistero”**.

Parolante pri la mistero, li ne komprenas ĝin kiel “mallumon”, sed, prefere, kiel “troan lumon”. Fakte “mistero ne estas neracia, sed estas superabundo da senso, da signifo, da vero. Se, rigardante la misteron, racio vidas mallumon, tiel ne estas ĉar en la mistero ne estas lumo, sed, male, ĉar ĝi estas troa. Same kiel, kiam la homaj okuloj direktiĝas rekte al la suno por ĝin rigardi, ili vidas nur tenebron; sed kiu dirus ke la suno ne estas luma, eĉ la fonto de la lumo?” (Benedikto la 16-a, Ĝenerala aŭdienco, 21-an de Novembro 2012).

Lastan eksplikon noton mi dediĉas al la titolo de ĉi tiu mallonga artikolo. En 1981 Pierangelo Sequeri publikigis muzikdiskon kun la titolo **“E mi sorprende”** (Kaj tio min surprizas), kies subtitolo estas **“Por kanti tion kion ni ne rajtus diri kaj ne kapablas prisilenti”**.

Inspiriĝante al tio mi prunteprenis de Sequeri la titolon por mia artikolo, kaj ĉar fakte la poezio de Iannacone kantas la eventojn de la vivo, ankaŭ tiujn plej kaŝitajn, kun forloganta simpleco, kaj ĉar ĉiufoje kiam mi ree legas la poemojn de Iannacone, ili ĉiam ree min surprizas. Kaj mi varme invitas ĉiujn ilin legi kaj ree legi. Sincere tio valoras la penon.

Esperantigis Carlo Minnaja

volteggiare su me / la tua grandezza. / So che mi hai concesso / un altro giorno. / So che mi hai perdonato. Che sei stato più buono / che giusto. / Perché tu vuoi / che la mia vita sia candida. / E se io non lo sono / sei tu che, / con la tua purezza totale, / ogni giorno cancelli il nero / perché io ricominci la vita / su un libro di nuovo bianco».

A questo punto concludo – ma solo perché non posso analizzare tutti i temi e tutte le poesie in un articolo – con il “mistero”, altro sottotono sonoro della produzione poetica di A. Iannacone, fino all’ultima raccolta pubblicata *Eppure*, che è tutta intrisa di mistero. Quando nella poesia **“Un poco di te”** parla dei suoi amici che sono morti prima di lui dice **«che hanno già varcato la soglia del mistero»**.

Parlando del mistero non lo intende come “buio”, ma piuttosto come “troppa luce”. Infatti «il mistero non è irrazionale, ma è sovrabbondanza di senso, di significato, di verità. Se, guardando al mistero, la ragione vede buio, non è perché nel mistero non ci sia luce, ma piuttosto perché ce n’è troppa. Così come quando gli occhi dell’uomo si dirigono direttamente al sole per guardarlo, vedono solo tenebra; ma chi direbbe che il sole non è luminoso, anzi la fonte della luce?» (Benedetto XVI, Udienza Generale, 21 novembre 2012).

Un ultimo appunto esplicativo lo dedico al titolo di questo breve articolo. Nel 1981 Pierangelo Sequeri pubblica un album dal nome **“E mi sorprende”**, che ha come sottotitolo **«Per cantare quello che non potremmo dire e non sappiamo tacere»**.

Ispirandomi a ciò ho preso in prestito da Sequeri il titolo per il mio articolo, sia perché in effetti la poesia di Iannacone canta i risvolti della vita, anche quelli più reconditi con una semplicità spiazzante, sia perché ogni volta che rileggo le poesie di A. Iannacone tornano sempre nuovamente a sorprendermi. E invito tutti vivamente a leggerle e rileggerle. Ne vale sinceramente la pena.

Chiara Franchitti

19 novembre 2018

NORME E QUOTE ASSOCIATIVE PER L'ANNO 2019

Associato ordinario <i>con Katolika Sento</i> (SO)	22,00 €
Associato giovane <i>con Katolika Sento</i> (SG)	11,00 €
Associato familiare <i>senza Katolika Sento</i> (SF)	11,00 €
Associato ordinario <i>con Espero Katolika</i> (SOE)	43,00 €
Associato sostenitore <i>senza Espero Katolika</i> (SS)	44,00 €
Associato sostenitore <i>con Espero Katolika</i> (SSE)	86,00 €
Solo abbonamento a <i>Katolika Sento</i> (AK)	10,00 €
Solo abbonamento a <i>Espero Katolika</i> (AE)	21,00 €

È associato giovane chi non ha superato i 25 anni. È associato familiare chi convive con altro associato.

Specificare nella causale del versamento la categoria dell'associato, l'anno di nascita dei giovani, l'esatto indirizzo per il recapito del periodico K.S., la destinazione di eventuali offerte. I gruppi locali con almeno 10 soci trattengono 2,10 € per l' associato ordinario e 1,05 per l'associato giovane o familiare.

I versamenti vanno fatti sul C.C. Postale n. 47127675 *Unione Esperantista Cattolica Italiana U.E.C.I.* codice IBAN: IT66 R076 0101 6000 0004 7127 675 Codice BIC/SWIFT: BPPIITRRXXX

Nota: Sull'etichetta/indirizzo con la quale avete ricevuto questa copia di *Katolika Sento* è indicata la sigla associativa e l'anno di scadenza dell'abbonamento.

COMITATO CENTRALE U.E.C.I.

Presidente: Tiziana **FOSSATI**, via F.Filzi 30/A, 20035 Lissone (MB) - tel. 039.464942
e-mail : katolika.sento@ueci.it (la residenza del presidente è anche sede dell'associazione)

Vice presidente: Francesco **FAGNANI**, Via Bartolomeo Eustachi 47, 20129 Milano

Segret./Cassiere: fra Pierluigi **SVALDI**, Santuario della Madonna del Frassino- Località Frassino, 4
37019 Peschiera del Garda - VR

Responsabile dei congressi: G.**CONTI**, via F.Filzi 51, 20032 Cormano (MI) - tel. 02.66301958

Consulente editoriale: Carlo **SARANDREA**, via Santa Bernadette 6, 00167 Roma

Addetto alla logistica: Felice **SOROSINA**, Via Sarnico 17, 24060 Tavernola (BG) – tel. 035.932298

Consigliere: Norma **COVELLI CESCOTTI**, via E.Fermi 29, 38100 Trento – tel. 0461.925210

Consigliere: Giovanni **GAZZOLA**: Via Cendrole, 32 - Spineda , 31039 Riese Pio X (TV)

Assistente Ecclesiastico: mons. Giovanni **BALCONI**, p.zza Duomo, 16, 20122 Milano

Nota bene: Tutte le comunicazioni alla redazione di *Katolika Sento* vanno spedite al presidente UECl.

En numero 5/6 2019 paĝo 16, la "Parolado al delegacio de Trentino- Alto Adige post ĝia donaco de la kristnaska arbo 2007" de Papo Benedikto la 16-a estas erare atribuita al Papo Paŭlo la 6-a.

Dankon al nia zorgema leganto Gerardo Vacana pro la rimarkigo pri la eraro.

